

voko el stirio

Bulteno de la Esperanto-movado en
Stirio kaj de la Esperanto-Societo
„Unueco“ Graz



Mitteilungsblatt der Esperanto-
Bewegung der Steiermark und des
Esperanto-Vereins „Einigkeit“ Graz

N-ro 368

junio / Juni 2022

Bonaj kaj malbonaj novaĵoj



Pere de ĵurnaloj, radio, televido kaj reto ni al kutimiĝis al konstanta fluo de informado pri murdoj, militoj, torturo, kruelaj atakoj, perforto, terorismo kaj tiel plu. Ne nur la informado mem sed ankaŭ multoblaj sensaciaj bildoj inundas la menson. Samtempe ni konscias ke ni havas preskaŭ neniun eblecon influi la tragediojn kaj krimojn kiujn ni vidas.

Spite de avertoj pri la danĝera influo de kruelaj scenoj sur la homa psiko, estas tre malfacile eviti tiajn “malbonajn novaĵojn”. Male la harstarigaj bildoj pli kaj pli fascinas homojn. Ili pasigas preskaŭ la tutan tempon antaŭ la ekrano de sia televidilo, tabuleta komputilo aŭ komputilo.

En multaj hejmoj la televidilo estas enŝaltita preskaŭ la tutan tagon kaj eĉ dum la nokto. Kelkaj infanoj restas sidante antaŭ ekrano dum averaĝe kvar ĝis sep horoj ĉiun tagon, kio signifas ke ili havas malmultan tempon por aliaj okupoj.

Hororigaj filmoj kaj militaj ludoj, kies enhavo povus perturbi eĉ la plej malmolkorajn homojn, estas tre popularaj, aparte ĉe adoleskantaj knaboj.

Antaŭnelonge artikolo en usona ĵurnalo taksis ke ĝis la aĝo de 16 jaroj usonaj infanoj vidas averaĝe 200.000 brutalajn okazaĵojn sur la ekrano, inter ili 33.000 murdojn. La ŝatataj komputiloj kaj tabuletaj komputiloj plimalbonigas la problemojn, ĉar neniu povas haltigi la disvastiĝon de eĉ pli teruraj bildoj. Ĉu infanoj povas ĉiam distingi inter realaj eventoj kaj fantazio? Oni konstatas ke la nivelo de timo ĉe multaj infanoj iĝas netolerebla kaj influas la disvolvon de ĉiuj kapabloj.

Lastatempe tamen ŝajnas, ke finfine pli kaj pli da verkistoj, psikologoj, filozofoj kaj ĵurnalistoj ekkonis ke antaŭ ĉio necesas estigi ekvilibron inter pozitivaj kaj negativaj novaĵoj.

En Usono, tradiciaj ĵurnaloj, ekzemple “New York Times” kaj “Washington Post”, jam enhavas novan sekcion kiu forte substrekas pozitivajn disvolviĝojn kaj solvojn, kaj ankaŭ en la reto troviĝas novaj alternativaj retejoj, ekzemple “Positive News” kaj “Good News Agency”, kiuj defias la aserton ke nur malbonaj novaĵoj estas interesaj. La fondintino de la populara ret-ĵurnalo “Huffington Post”,

Arianna Huffington, klarigas: “ Ni devas prezenti pozitivajn novaĵojn tiel senindulge kiel la negativajn, alie ni donas al niaj legantoj malĝustan bildon pri nia mondo kaj inklinigas ilin al malsaniga sinteno”.

En ŝia ĵurnalo, rakontoj kiuj plifortigas optimismon pri la estonteco de la homaro estas legitaj trioble pli ofte ol aliaj artikoloj. Malbonŝance ili ofte estas bagatelaj kaj sentimentalaj. Tamen multaj legantoj komentas la artikolojn kaj raportas ke post la tempo ke ili legas nur “pozitivajn novaĵojn” , ili vere sentas sin multe pli optimismaj pri la estonteco de si mem kaj de siaj infanoj.

Kvankam oni povas bone kompreni kial multaj homoj deturnas sin de teruraj bildoj sur la ekranu, ŝajnas al mi, ke tute ignori gravajn problemojn estas danĝera alternativo. Mia solvo estas ke mi tre malofte rigardas televidon aŭ retajn bildojn de katastrofoj sed koncentras mian atenton sur seriozajn ĵurnalojn kaj radioelsendojn kiuj klopodas prezenti objektivajn informojn kaj opiniojn.

Tiun-ĉi sonartikolon verkis kaj produktis Sheila Spielhofer el Aŭstrio en Esperanta retradio blogspot.com, sendita de Leo Patek.



La hundo pensas: „Ili amas min, ili min manĝigas, ili zorgas pri mi – ili devas esti dioj!“

Kaj **la katino pensas:** „Ili amas min, ili min manĝigas, ili zorgas pri mi – mi devas esti diino!“



CIGNO, EZOKO KAJ KANKRO

Se inter kolegoj jam en la komenco en ia afero malestas konsento, senfrukta restados ilia intenco, anstataŭ afero nur estos turmento. Okazis, ke kankro kun cigno, ezoko, por ŝarĝon transporti de loko al loko, trioje al veturigil' enjungiĝis kaj tre diligente de l' loko tiriĝis. Sed malgraŭ ilia grandega fervoro nenion alportis ilia laboro. Ekstreme facile ĝi estus por trio, se ili laborus nur en harmonio. Sed al la ĉielo la cigno sin tiras, la kankro obstine returne foriras, l'ezoko al akvo la ŝarĝon kunŝiras. Nun kiun pravigi kaj kiun kulpigi, mi certe kaj tute ne povus klarigi, sed la veturilo eĉ paŝon ne faris, ankoraŭ ĝi staras nun, kie ĝi staris. M. Goldberg.

El "Fundamenta Krestomatio" de L. Zamenhof. *Sendita de Leo Patek*



Citaĵo de la tago

„Jes, ĉiu volas vivi longedaŭre, sed neniu volas maljuniĝi.“

La aŭstra poeto Johann Nepomuk Nestroy (1801 – 1862)

Malbono vekas pli da atento ol bono



Bonŝancaj homoj pli similas unuj al la aliaj ol malbonŝancaj. Ĝenerale pozitivaj fenomenoj pli egalas ol negativaj.

Ĉe la suna flanko de la vivo troviĝas ĉiam la samaj figuroj. Tie sufiĉas jam rigardo al la beluloj, riĉuloj, bonŝanculoj ĉe Instagramo por percepti tion. En la samaj pozoj staras tie la homoj kiujn la hazardo kisis, kun la ĉiam egalaj statusaj simboloj, montras la saman rideton kaj konfuzo similas unuj al la aliaj.

Kien falas la brilega lumo de la bonŝanco, tie estas malmulte da ombro kaj apenaŭ kontrastoj. La literaturan citaĵon pri tiu ĵus formulita avantaĝo liveris la rusa verkisto Leo Tolstoj per sia malferma frazo de "Anna Karenina": Ĉiuj bonŝancaj familioj similas unuj al la aliaj, ĉiu malbonŝanca familio estas malbonŝanca laŭ sia maniero", li tie skribis. Kaj evidente li trafis la najlon sur la kapon: Psikologoj de tiam okupiĝis pri tiu demando kiu dormetas en tiu eldiro, kaj ili atingis la rezulton ke la malbono havas pli da facetoj ol la bono.

Esploristoj en Los Altos, Usono kaj en Prago, Ĉeĥio, ĵus publikigis studaĵon kiu aldonas al la esplora literaturo pri tiu fenomeno pluan ĉapitron. Bonŝancaj, sanaj kaj bonstataj homoj laŭ tio pli forte similas unuj al la aliaj en multaj parametroj - ekzemple en personeco kaj imagataj valoroj - ol personoj kiuj estas malpli dorlotitaj de la vivo.

La esploristoj analizis por sia studaĵo plurajn grandajn datumarojn. En la analizitaj datumaroj la rezultoj en la analizoj de personeco egalas des pli forte ju pli bone staris la koncernaj personoj ĉe la suna flanko de la vivo. Ankaŭ en kognaj testoj tiuj homoj atingis en la studaĵoj rezultojn kiuj similas pli forte ol tiuj de testpersonoj kiuj havis malfacilan vivon.

Dum la pasintaj jardekoj psikologoj trovis multajn pruvilojn por la pli granda varieco kaj la pli forta efiko de la negativo. Tiel homoj rememoras pli bone pri malbonaj eventoj. Ili pli rapide ekkonas vortojn kun malserena signifo el kiuj en plej multaj lingvoj ankaŭ ekzistas pli da ili: La semantika spaco kiu estas okupita de la malbono etendiĝas pli ol la spaco pri la bono. La priskribo de negativaj emocioj disponas pri pli granda vortaro ol tiu de bonŝancaj statoj. Ĉiukaze negativaj novaĵoj estas pli forte atentataj. Kaj fine malhonorindaj agoj vekas pli fortan bezonon pri ekkono de kaŭzo kaj farinto.

Do evidente, tiel konkludas la esploristoj, Leo Tolstoj en sia granda unua frazo de "Anna Karenina" eldiris veron. Restas la demando kial la malbono estas pli varia? Supozeble negativaj eventoj provokas pli grandan premon kompreni kaj analizi ilin - por povi eviti ilin estonte.

Sendita de Leo Patek

Por kio Esperanto



estas plej utila

La mondo de hodiaŭ estas tute alia ol tiu de la jaroj 1887 aŭ 1905, kiam okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto. Tiam la eblecoj por parola komunikado inter homoj el diversaj landoj estis tre limigitaj: Vojaĝi eksterlanden eblis nur al tre malmultaj homoj, kaj la telefono ankoraŭ ne servis por la komunikado de simplaj homoj. La radio estis ankoraŭ ne ekzistanta, kaj pri televido oni eĉ ankoraŭ ne revis.

Hodiaŭ vojaĝoj eblas ankaŭ por tute ordinaraj homoj, la telefona komunikado kovras la tutan terglobon kaj la kostoj por internaciaj telefonalkvotoj estas pageblaj. Radio kaj televido elsendas siajn programojn per satelitoj kaj fine la interreto entute forigis landlimojn de komunikado.

Kaj hodiaŭ eĉ ekzistas grandmezure lingvo por internacia komunikado, nome la angla. Ĉio tio ŝanĝas la eblecojn por Esperanto servi kiel internacia lingvo.

Zamenhof certe imagis multe pri skriba aplikado de la lingvo, kaj dum lia vivo ja ankaŭ aperis multaj revuoj, gazetoj kaj libroj en Esperanto. Post la Unua Mondmilito Esperanto ja ekfloris, sed la monda ekonomia krizo de la jaro 1929

detrUIS ne nur la esperojn pri prospero sed ankaŭ pri paca kunlaboro helpe de Esperanto. Sekve la Dua Mondmilito kaj la ĉefaj diktaturoj eĉ pli akre neniigis ĉiujn esperojn. Kaj post la jaro 1945 establiĝis nova politika ordo en kiu la angla lingvo akiris la plej gravan rolon rilate al internacia komunikado.

Do ni devas demandi nin, por kio entute hodiaŭ Esperanto povas servi? La respondo estas, ke ĝi ja povas servi al homoj en la tuta mondo, sed ne kiel ĝenerala lingvo por ĉiuj, sed kiel neŭtrala lingvo por homoj kiuj serĉas rektan personan kontakton kaj rektan komunikan interŝanĝon por aŭ lerni pli pri la mondo aŭ pri specifa fako, aŭ por havi amikajn rilatojn kun homoj el aliaj landoj.

Tio signifas ke male al la situacio de antaŭ pli ol cent jaroj, kiam oni povis plejparte nur skribe interrilati kun homoj el aliaj landoj, hodiaŭ ĉiu formo de rekta komunikado estas ebla, precipe la parola.

Esperanto ne havas realan lokon, ĝi estas ĉie kaj nenie. Sed ĝi jam estas universala lingvo en la virtuala mondo, nome en la interreto. Tamen tio ne sufiĉas: Homoj volas reale renkontiĝi por paroli rekte unu al alia. Tial Esperanto povas okazi en provizoraj lokoj kie homoj kunvenas dum kelkaj tagoj, dum semajno, aŭ fojfoje dum kelkaj monatoj.

La aplikado de Esperanto havas nur sencon, se la lingva nivelo estas sufiĉe alta. Balbuti oni povas ankaŭ en aliaj lingvoj. La taŭga formo por altnivela parolado estas prelegoj aŭ teatraĵoj. Tie prezentiĝas origine skribaj tekstoj al sufiĉe multaj spektantoj. Tio taŭgas precipe por internaciaj seminarioj, kursoj, laborgrupoj ktp.

Do la parola prezentado (aŭ laŭtlegado) de antaŭe verkitaj tekstoj estas la plej taŭga

rimedo por vivigi Esperanton je sufiĉe alta nivelo. Tio povas okazi reale en internaciaj aranĝoj, aŭ en la interreto, ekzemple kiel ĉi tie en la Esperanta Retradio. Ambaŭ estas necesaj. Ankaŭ dum internaciaj aranĝoj la lokaj partoprenantoj povas esti kunligitaj kun foraj partoprenantoj helpe de la interreto.

Kaj hodiaŭ la homoj sur la tuta planedo havas eĉ komunan temon: Kiel protekti la vivmedion por ke la homaro povu vivi sur ĉi tiu planedo ankoraŭ post 50 aŭ 100 jaroj? Do eblas serioze labori multe helpe de Esperanto. La valoro de Esperanto ne estu subtaksata.

Tiu-ĉi sonartikolo estis skribita de Mag. Anton Oberndorfer en Esperanta retradio. blogspot.com, sendita de Leo Patek.



Klubvesperoj

plue okazos je la unua ĵaŭdo de la monato je la 19-a horo en la **Lendhotel**, Grüne Gasse 2. Se ne pluvas – ĉar ni ja devos sidi ekstere – je la

2-a de junio kaj post la somera paŭzo je la **1-a de septembro**.



Citaĵo de la venontaj tagoj...

„Malmulto dependas de ni, eble eĉ nenio. Sed la ideo mem de Esperanto estas mondpaco kaj interkompreniĝo. Ideo de Esperanto estas nek milito, nek speciala operacio de ajna armeo kiel en Ukrainio.“

Grigorij Arosev: Eksa prezidanto de Rusia esperanto-Unio



Ĉina kompanio CRRC fin-pretigos kaj luos serion da elektraj motorunuoj al **aŭstra** trafikkompanio **WestBahn** en la jaro 2023. De la *IFEFE* - Internacia Fervojistia Esperanto Federacio, sendita de Leo Patek per vizaĝlibro

Impressum



Mitteilungsblatt des Grazer Esperanto-Vereines Esperanto-Societo Stirio „UNUECO“
Für den Inhalt verantwortlich:
Dr. Heinz-Paul Kovacic
Panoramagasse 3, 8010, Graz
Tel. 0664 3264027
heinz-paul.kovacic@aon.at

Naturaj matematikaĵoj



Galileo diris, ke matematiko estas la alfabeto, per kiu Dio skribis la universon. Konfirmas tion multaj fenomenoj kaj formoj troveblaj en ĉiuj naturaj regnoj. Matematiko estas en la naturo, en mineraloj, vegetaĵoj kaj en eĉ en la homa korpo.

En la antikveco, la romia arkitekto Vitruvio prezentis studon pri la proporcioj de la homa korpo. Li montris, ekzemple, ke la distanco de la mezo de la torako ĝis la kaposupro estas kvarono de la staturto; se oni malfermas la du brakojn, la tuta longo, de la pinto de unu mano ĝis la pinto de la alia, egalas al onia staturto; la longo de la mano estas dekono de la staturto; la longo de la piedo estas sesono de la staturto, ktp. Post jarcentoj, en la Renesanco, Leonardo da Vinĉi inspiriĝis en Vitruvio por desegni la faman vitruvian homon, enkadrigitan samtempe en cirklo kaj en kvadrato.

Kiam la falko persekutas sian predon, ĝi ne flugas laŭ rekta linio, sed laŭ logaritma spiralo, ĉar tiamaniere dum la tuta flugo ĝi tenas la predon en sia vidkampo. Pro tio, ke ĝiaj okuloj situas sur la flankoj de la kapo, la falko bezonas konservi ĉiam la saman inklinon rilate al sia celo, kaj tio eblas nur, se ĝi flugas laŭ tia vojlinio, en logaritma spiralo.

Alia ekzemplo de natura matematikaĵo estas la ĉeesto de la serio de Fibonacci en arbokreskadoj. Ekde la trunko, la branĉoj aperas laŭ la serio 1, 2, 3, 5, 8, 13, 21, 34...., kiu estas la serio de Fibonacci. Unu el la proprecoj de tiu serio estas, ke la

limeso de la divido de ĝiaj apudaj elementoj ($1/2, 2/3, 3/5, 5/8, 8/13, 13/21, 21/34...$) estas 0,618, tio estas, la inverso de la numero Φ (fi), kiu rilatas al la nomata ora proporcio, ofte uzata de artistoj serĉantaj harmonion kaj vidata en kelkaj plantoj, floroj kaj insektoj.

Kaj eble la plej mirinda matematikaĵo en la naturo estas produktata de la abeloj, kiel pruvis famaj sciencistoj de la 18a jarcento. Ili eltrovis, ke la abeloj konstruas la mielĉelojn celante havi maksimuman volumenon per minimumo da materialo, kaj ke ili atingas tion solvante problemon ne de simpla geometrio, sed de trigonometrio kaj de infinitezima kalkulo. La laboro de la abeloj estas tiel preciza, ke ili fermas la ĉelojn per tri romboj, apudmetitaj laŭ angulo de $70^{\circ}32'$. Komence oni diris, ke la abeloj ne estas perfektaj, ĉar, laŭ la matematikisto Samuel König, la plej optimumiga angulo devus esti $70^{\circ}34'$. Tamen poste alia matematikisto, Colin Mac-Laurin, konstatis, ke lia kolego uzis logaritmotabelon kun erareto. Refarinte la kalkulojn, Mac-Laurin pravigis la abelojn: la ĝusta fermangulo estas fakte $70^{\circ}32'$. Tiuj ekzemploj sufiĉe montras, ke Galileo pravis: Dio uzis la matematikon por skribi la leĝojn de la universo.

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis José Mauro Progiante el Brazilo en Esperanta retradio.blogspot.com, sendita de Leo Patek. Koran dankon!